

Trevor Steele

*Estas la volo de Providenco
kaj pli bone ke ili mortu ĉi tie kie oni bonkore
traktas ilin ol ke ili estu alpafataj
kaj malhumane detruataj de la fia elemento
de la eŭropa komunumo.*

PARADIZO ŜTELITA

FEL

PARADIZO SHELITA

Romano de Trevor Steele

Paradizo ŝtelita

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

n-ro 36 en la serio "Stafeto"



Tiu ĉi e-libro estas nekompleta provversio kaj rajtas esti kopiata .

Pri similaĵoj inter la rolantoj de tiu ĉi romano kaj historiaj personoj kulpas
ne la aŭtoro sed la historio mem.

Mi dediĉas ĉi tiun romanon al mia edzino Katja,

al mia filo David,

kaj al mia amiko Bob

ROLANTOJ

Ni veturis de Southampton, paŭzis en Rio, poste en Kaburbo, tiam pluveturis al la celo. Ni laŭveturis grandan parton de la kontinento Afriko, kiun ni – la edukitaro de nia deknaŭa jarcento – nomas “la malluma”. Sed sendube vivas tie multaj milionoj da homoj nekonataj al ni, kaj por ili Afriko estas normala vivejo: eble ili supozas, ke estas malluma kontinento norde de Afriko.

Mirinde, ke pluraj centoj da homoj interpuŝiĝantaj sur tiu ligna veturilo, katapultataj de tuko ventoturmentataj, sukcesis atingi lokon aliflanke de la planedo. Kia triumfo de nia teĥnologio! Survoje la triumfa sento daŭre cedis al ia alia: monatoj da kaptiteco en sufoke mallarĝaj spacoj malsanigis nin, kaj jes, mortis almenaŭ tri – jen laŭ mia scio la kutima perdolisto dum tutgloba veturo. Tropikaj tagoj ŝvitigis kaj mizerigis nin. Mi memoras kun naŭza sento tagojn, kiam pro manko de vento nia ŝipo apenaŭ moviĝis, kio nervozigis kaj kvereligis.

Sed la lasta longa etapo de la vojaĝo estis tute alia: nin puŝegis la ventegoj nomataj la kriegantaj kvardekaj. Tiam ni sentis malan timon: ĉu la sovaĝaj ventoj portos nin preter la lasta kontinento? Ĉu ni sukcesos ĝustamomente maldekstreniĝi kaj trovi havenon, aŭ ĉu ni senhelpe plueniros ĝis dronmorto en iu timveka suda oceano?

Nia celo estis tiu kontinento nomata Nova Holando aŭ, kiel oni pli kaj pli diras, Aŭstralio, la teramaso plej fora de Anglio, la kloako ricevanta la kanajlaron de niaj britaj malliberejoj. Pli specife, ni veturis al la suda insulo, la periferio de tiu periferia kontinento. Inter tiu insulo, Van-Dimendlando, kaj la neimageblaj glacioj kaj neĝoj de Antarktio, estas nur la kirliĝantaj akvomontoj de neesplorita maro.

Tiu insulo, same granda kiel Irlando, havas onidire belajn pejzaĝojn, sed tio, kion ni unue spertis, stampas ĝin infero, home farita infero. Nia ŝipo ankris en Macquarie-Haveno ĉe la okcidenta marbordo. Pene ni eniris la mallarĝan enirejon. Ni pasaĝeroj ne komprenis, kial ni entute albordiĝas tie. Baldaŭ ni eksciis almenaŭ unu kialon: ni transportos al Hobarto dekon da malliberuloj, kie oni procesos kaj poste pendumos ilin. La peze

katenitaj mizeruloj aspektis eĉ gajaj, kiam ili albordiĝis. Oni flustris, ke pluraj eĉ murdis por eskapi for de Macquarie-Haveno. Ili preferis morti ol plu elteni la vivon de vipataj ŝarĝobestoj konstante alkriataj de brutalaj gardistoj. Alia pasaĝero klarigis al mi, ke la punkolonio de Macquarie-Haveno estas la plej lasta stacio de tiu mondo de karceroj. Oni sendas kulpulojn el Anglio al Nova Holando; la obstinajn nesubordiĝemulojn oni sendas al Van-Dimen-Lando; kaj el ili la plej rezistaj iras al Macquarie-Haveno.

Eĉ la topografio kaj vetero kunkonspiras por malagrablighi la vivon tie. Ofte hurlis malvarmaj ventoj de la maltrankvila maro okcidenta, kaj foje ili ĵetis sur nin pluvon. La plej pluva loko de la tuta kontinento, ni aŭdis. Sed la malbona vetero ne haltigis la laboron de la katenitoj, kiuj dekope portis arbotrunkojn aŭ faris aliajn tre pezajn taskojn sub kontrolo de vipoportaj kaj kriemaj gardistoj. En almenaŭ du lokoj mi vidis triangulan strukturon el kruda ligno, kies celon oni facile divenis: tie oni donas 100, 200, aŭ pli da vipobatoj sur dorson kaj gluteojn. La pluvo ne sukcesis tute forigi la plej freŝajn sangomakulojn. Oni diris al ni, ke preskaŭ ĉiutage unu aŭ du mizeruloj ricevas tie naŭzan porcion de haŭtŝiraj batoj. Povas esti, ke la ŝrikantaj ventoj malaŭdebligas iliajn dolorkriojn.

Dum kelkaj momentoj mi ekvidis tri homajn formojn aperi inter arbojn. La homoj dummomente rigardis la scenon, kaj solene malaperis. Ili estis nigruloj, la originalaj loĝantoj de la insulo. Ili evidente ne havis rolon en la mondo kreita de ni eŭropanoj. Sed tiu efemera vidaĵo spronis mian intereson. Se Macquarie-Haveno estas speco de horora purgatorio por ni anglaj burĝoj, kiel la aborigenoj komprenu ĝin, kiel ili reagu entute al nia invado sur ilian teritorion? Mi decidis fari demandojn.

Ni ĉiuj volonte lasis la fian punkolonion malantaŭ ni kaj veturis pluen al la ĉefa vilaĝo, kiun oni nomas Hobart-Urbo.

Kun glacia ĝentileco la eksa vicguberniestro ordonis al mi eksidi, dum li paŝis de unu fenestro al alia. Mi apenaŭ povis deturni mian rigardon de

liaj haroj, lerte kombitaj antaŭen por kaŝi lian kalvaĵon. Lia pinta supra lipo sendube pliakrigis milojn da ordonoj donitaj dum dek du jaroj da regado.

“Sciu, sinjoro, mi ne kutimas akcepti homojn de la burĝa klaso en mia privata domo. Sed laŭ via letero vi estas historiisto. Ĉu prave?”

“A, jes, via moŝto.”

“Do mi decidis esceptokaze akcepti vin. Unue pro tio, ke mi ne plu estas oficiale la vicguberniestro. Vi sendube scias, ke mi ekvojaĝos al Anglio ĉi-semajne. Kaj due, mi bonvenigas la ŝancon prezenti al eksterulo tion, kio vere okazis en Van-Dimen-Lando dum la lastaj dek du jaroj.”

La akra, mallarĝa kapo sur la longa, mallarĝa korpo rigardis en regionojn senespere alte super mia humila kapo. Kiam li de tempo al tempo rigardis min rekte – kion li ne ofte faris – mi konsciis, ke ne temas pri intervjuo. Li monologis, kaj atendis, ke mi transdonu al la mondo lian tekston. Mi apenaŭ kuraĝis fari demandon, kaj lia subita “Do diru, kion vi volas scii?” trafis min neatendite. Sed necesis diri *ion*.

“Nu, via moŝto, onidire via eksiĝo el la ofico ne estis, nu, ne estis via propra decido.”

“Prave, kvankam lastatempe la fiagado de miaj multaj malamikoj lacigis min. Fine ili sufiĉe misfamigis mian nomon, ke la saĝuloj en Londono – en la Kolonia Oficejo – decidis eksigi min kaj ĵeti novan ŝafidon en la buŝon de la leonoj.”

Mi aŭdacis provi rideti. “Kolonelo Arthur kiel ŝafido? Ĉiuj diras, ke dum via regoperiodo vi estis ĉiam la ĉefa figuro de la vivo en Van-Dimen-Lando. Fakte pli simila al leono ol al ŝafido!”

“Jes, eĉ miaj malamikoj – kiuj estas sennombraj – cedas almenaŭ tion!” Estis momenta glimo de kontentiĝo en la malvarmaj okuloj. Eble tiu eta kontentiĝo memorigis al li, ke li gastigas min. “Cetere, mi ŝatus glason da vino. Ĉu ankaŭ vi?”

“Jes, volonte, via moŝto.”

La eksa vicguberniestro tintigis, kaj servisto aperis. “Smithers, du glasojn kaj botelon de mia plej ŝatata, vi konas ĝin.” Kolonelo Arthur paŝis tien kaj reen, atendante la alvenon de la vino. Mi daŭre sidadis kaj pensis pri la paradokso ke mi, nura burĝo, sidas, dum la aristokrata reprezentanto de Lia Reĝa Moŝto staras. Mi apenaŭ imagas lin sidanta, sed oni diras, ke li skribis ĝis dudek horojn tage, kaj superŝutis la oficistojn de la Kolonia Oficejo per montoj da korespondaĵoj.

“Sinjoro, mi ne volas dikti, kion vi skribos ...” Li paŭzis, kaj ni ambaŭ sciis, ke ĝuste tion li celas. “Sed mi honeste kredas, ke mia fina malvenko ĉi tie estis almenaŭ parte venko de la Malamiko de la Homaro.”

“De Satano mem, via moŝto?”

“Jes. Li montras sin diversmaniere, sed li tre diligente atakis min ĉi tie ekde la unua tago de mia laboro.”

“Hm, jes ... Tamen en historia teksto ...”

“Mi klarigu. Oni sendis min ĉi tien en 1824 por regi *punkolonion*. Tio estis la esenco de mia tasko, kaj tion mi akceptis, kaj tio motivis mian penadon dum dek du jaroj.”

“Kaj kiel via moŝto interpretis la vorton ‘punkolonio’?”

“Vidu, oni foje forgesas, ke la celo de la tuta projekto veni al tiu ĉi kontinento estas plicivilizi la loĝantaron de Granda Britio. Nia lando estas la plej potenca de la mondo, ni rajtas vere fieri pri ĝi, sed samtempe estas nekredebla krimado, drinkado, ŝtelado, falsado de monbiletoj – la Diablo vere triumfas. Ni forsendas la kanajlojn de la dua grado – do ne la ĉefbanditojn, ilin ni pendumas en Tyburn – la ceterajn krimulojn ni vojaĝigas al la alia flanko de la mondo, ke Britio estu lando, en kiu vivoj kaj privataj posedaĵoj estu sekuraj, kie oni laboru kaj ne faru krimojn.”

La kolonelo paŝis pli kaj pli rapide kaj gestis pli larĝe. Evidente li ripetis argumentojn, pri kiuj li skribis centojn da fojoj. “Alivorte, ni forsendas el Britio senvalorajn homojn, ni devas ilin puni. Sed se onidiroj disvastiĝas, ke en la kolonioj iamaj karceruloj prosperas – kaj mirige multaj el ili ja faris tion pro troa dorlotado far miaj antaŭuloj – kian sencon havas sendi ilin?”

Li paŭzis kaj esceptokaze rigardis rekte en miajn okulojn. Mi kredas, ke miaj okuloj provis ŝajnigi, ke mi konsentas pri ĉiu vorto.

“Jes, kial ne tuj pendumi en Anglio? Multaj rakontoj pri riĉiĝintaj eksmalliberuloj atingas la aĉkvalitajn kvartalojn de Londono, kaj jen – tio eĉ spronas la fiulojn ion ŝteli kaj esti senditaj al la *paradizo* de Van-Dimen-Lando ...”

Kolonelo Arthur stamfis kaj elkraĉis *paradizon* tiel, ke mi estis certa, ke li absolute ne dorlotus krimulojn. “Mi pendumigis centojn da kanajloj, kaj mi fieras pri tio. Krimuloj devis atendi justecon, ne kompaton miaflanke.”

“Mi jam vidis la punejon de Macquarie-Haveno. Estas malfacile imagi, ke rakontoj pri ĝi spronus la deziron esti sendita tien.”

“Tio pravas. Sed ĉiuj ĉi tie scias pri Macquarie-Haveno. La homoj tie estas plene submetitaj al Satano, ili igas malesperi pri la pekoplana homa raso. Sed la dolĉaj rakontoj pri *paradizo* ...” refoje li stamfis, “temas pri aliaj, pli mildaj partoj de la insulo.”

“Kion diable faras Smithers, mi ŝatus scii! Cetere, alia problemo, kiu iam ege maltrankviligis ĉiujn, estis la arbaraj banditoj, tiuj ‘boŝvagantoj’, forkurintaj malliberuloj, kiuj vivis de rabado kaj formis foje grandajn bandojn kaj teruris la ceterajn civitanojn. Dum jardekoj ili estis preskaŭ alternativa registaro.”

Kolonelo Arthur ĝuetis ankoraŭ alian etan momenton de memkontento. “Mi rifuzis iliajn impertinentajn proponojn pri ‘kompromisoj’ kaj elspezis por sendi soldatojn fojon post fojo, ĝis tiuj, kiujn ni ne mortpafis, ni pendumis. Alia taktiko, kiu tre sukcesis, estis doni amnestion al la malpli fiaj, ke ili rakontu pri siaj banditaj kolegoj. Vere tre sukcese. Eĉ miaj malamikoj ne povis kritiki min tiurilate.”

“Via moŝto, tuj post alveno en Hobert-Urbo oni vidas, ke temas ne nur pri malliberuloj, ke estas jam miloj da liberaj setlantoj ...”

“Jes, kaj jen granda parto de la problemo. La saĝuloj de Londono devas decidi, ĉu ili volas havi punkolonion aŭ volas setligi la teron per volontaj enmigrintoj. Kaj tiuj setlantoj vere malfaciligis mian laboron. Ili havas tiajn iluziojn pri siaj rangoj kaj valoro, ho jes, kaj ili kriĉis, kiam mi ne invitis ilin

al vicguberniestra akcepto.” Malgraŭ ĉio kolonelo Arthur sentis ian plezuron pro la kolero de la parvenuoj.

Smithers eniris kun pleto, sur kiu estis vinbotelo kaj du glasoj, kaj provizore la maltrankvila paŝado de lia moŝto ĉesis.

“Je Herkulo, Smithers, tio longe daŭris! Ne komencu vian vi-scias-kion frue hodiaŭ.” La kolonelo eksidis, dum Smithers plumpe manipulis sian ŝarĝon. Kiam Smithers senvorte foriris, mi rigardis lin kun surprizo: ŝajnis al mi, ke li iom ŝanĉeliĝas.

Kolonelo Arthur komentis: “Jes, Smithers jam iom drinkis. Mi ne forsendis lin, ĉar li estas malparolema kaj fidela servisto, kaj malofte tute ebria. Tri elstaraj kvalitoj en tiu ĉi malbenita lando. Pli oni ne povas postuli. Kaj kreu min, apenaŭ estas homo en nia *paradizo*, kiu ne tro drinkas, inkluzive virinojn. Kaj la pastroj – ho, kiel ili glutas rumon!”

La eksa vicguberniestro eksidis kaj verŝis al ni glason da vino. Li ne diris la kutiman *santé*, sed ektrinkis, kaj mi juĝis permesite, ke ankaŭ mi levu mian glason.

“Ne kreu, sinjoro, ke drinkado estas la sola malvirto de Van-Dimen-Lando. Mi ne menciis la rigidnukajn papistojn el Irlando. La homoj ĉi tie ridas pri la dek diaj Ordonoj. Blasfemado estas parto de ĉiutaga konversacio. Kiam naskiĝas infano, kiel la patrino sciu, kiu estas la patro? Laŭdire inter la malliberuloj – kaj ne nur inter ili – regas tiu peko, kiun oni ne menciis.” Li skuis sian mallarĝan, aglosimilan kapon, kaj estis severa glimo en la grizaj okuloj.

“Sed mi ne finis pri la orgojlaj setlantoj. Ili fondis ĵurnalojn – la skribstilo estas nekredeble malbona kaj taŭtologia – kun la sola intenco ataki min kaj la organojn de la ŝtato. Ili multe histrionas pri libera esprimrajto, sed nur obstaklas la funkciadon de la aŭtoritato tiel necesa ĉi tie. Mi diras al vi, sinjoro, estas ĉi tie la semoj de *revolucio*!”

Homoj de nia generacio scias, kion signifas *revolucio*: anarĥion kaj poste iun Napoleonon. Mi mienis same konsternita kiel la aristokrato aliflanke de la tablo.

“Kaj malgraŭ siaj pretendoj al digno kaj indo tiuj homoj estas el la sama

Ŝtofo kiel la oficialaj malliberuloj. Ili celas, krom leviĝi al alta socia rango, nur riĉiĝi – iel ajn. Ĉu per spekulado pri tero, ĉu per komercado per rumo, ĉu per prostituado de la edzino. Aĥ, fajnaj homoj ili estas! Kaj terure ĉagrenis ilin, ke mi komprenas iliajn fiajn projektojn kaj laŭeble malebligas!”

Ĉar lia moŝto dummomente paŭzis por trinki, mi fine faris la demandon, kiun mi ja delonge volis fari. “Via moŝto, mi legis taksojn, ke iam vivis pluraj miloj da aborigenoj sur la insulo. Ĉu vi havas fidindajn statistikojn pri la nuna nombro?”

“Aĥ, la aborigenoj! Oni ja povas iomgrade kompreni ilian reagon al nia koloniado.” Li evidente ion memoris. “La tagon, kiam mi aljuĝis al s-ro Gouger 1000 akreojn apud la Suda Esk-Rivero, li rikanis kaj diris, ‘Via moŝto, vi ĵus donis al mi la plej bonan teron de la tribo Paniher, kaj je Dio mi ĝuos nun forĉasi tiujn nigojn!’ Ĝis tiam mi eĉ ne pensis pri la pretendoj de la sovaĝuloj. Ne plaĉas al mi s-ro Gouger, li estas dika, aroganta ulo. Se mi estus paniherano, eĉ pli li malplaĉus, sendube.”

La relativa mildeco de tiuj vortoj donis al mi kuraĝon demandi, “Ĉu direblas, ke la alveno sur Van-Dimen-Lando en si mem signifis la neeviteblan finon de la aborigenoj?”

Nekarakterize li iom hezitis. “Nu, miaj ordonoj estis regi punkolonion kaj samtempe malfermi la vojon al liberaj bienistoj. Tiuj du funkcioj jam kreas grandajn problemojn, ne estas facile kombini ilin. Sed se vi aldonas la problemojn pri la nigruloj ...”

Mi komprenis: la nigruloj estis por kolonelo Arthur, la severa, Di-tima guberniestro, aldona problemo, ne prioritato.

“Vidu, granda parto de la problemo estas la primitiveco de la aborigenoj. Ili vagadas tra arbaroj kaj laŭ marbordoj, kultivas nenion, kaj kontribuas nenion utilan al progreso. Ilia nomada vivmaniero signifas, ke ili pretendas posedi grandan terenon, multe pli grandan, ol ili bezonus, se ili kultivus la teron aŭ paŝtus bestojn. Estus loko kaj por ili kaj por la setlantoj, se nur ili adoptus pli produktan vivmanieron. Sed ne, ili rifuzas vidi, ke tiu antikva nomadeco ne estas parto de la moderna vivo. Mi supozas, ke ili formortos, kaj eble baldaŭ.”

“Pardonu, ke mi ripetas demandon, sed ĉu oni scias, kiom da ili nun vivas?”

“Eble miloj, eble nur centoj. Robinson – vi aŭdis pri nia fama Akordiganto, ĉu ne – Robinson diris al mi, ke eble temas nun pri nur dekoj.”

“Ni en Londono multon legis pri la Nigra Linio ĉi tie. Kiun vi ordonis. Ĉu vi ŝatus rakonti pri tio?”

“Ne vere.” Lia parolkutima buŝo klake fermiĝis, kaj mi timis, ke jen la fino de la temo. “Sed mi volas ĝustigi kelkajn miskomprenojn, do jes, mi parolos pri tiu bedaŭrinda necesaĵo.”

Kompreneble mi iom ofte vidis la maljunulinon surstrate. Estus malfacile ne rimarki miniaturan dikulinon kun nigra haŭto, ruĝa turbano, serĝa robo, verdaj trikotjako kaj skarpo, daŭre ĉirkaŭatan de hundoj, kaj fumantan pipe. Truganini ĝuis la melankolian renomon esti la lasta de sia raso, oni eĉ nomis ŝin “reĝino Truganini”. Reĝino sen regatoj. Mi sciis, ke tre konsilindas, ke mi baldaŭ intervjuu ŝin. Ŝia tusado lastatempe heroldis iaman morton.

~~~~~

“Bonan tagon, sinjoro,” diris s-ino Dandridge, la eterne pacienca. “Ŝi pretas paroli al vi. Bonvolu eniri. Ŝi sidas kiel kutime sur la malantaŭa ŝtuparo.”

Mi sekvis s-inon Dandridge tra la domo al la ŝtuparo, kie la etstatura damo elbuŝigis la pipon kaj ekstaris, iom malvigle, por min akcepti. Mi rimarkis, ke ŝi ĵus trafoliumis la londonan *The Times*, kvankam ĉiuj scias,

ke ŝi estas analfabeta. Mi proponis mian manon, ke ŝi ĝin skuu, sed tiun anglan kutimon ŝi evidente ne ŝatis. Starante proksime al ŝi, mi konstatis, ke ŝi havas retaron de mentonaj haroj.

“Ni ĉiuj eksidu en la salono, ĉu ne?” proponis la dommastrino.

Ni eksidis en la salono. Mi diris, “Dankon, ke vi pretas paroli al mi, Truganini ...”

Kolere ŝi interrompis: “Trukanini, stulta viro, ne Truganini! Mia nomo Trukanini. Mia patro doni nomo. Trukanini, tio planto apud maro. Tio mia nomo!” Ŝi kolere fiksas min per fajroŝprucaj okuloj.

“Eĥ, pardonu, Tru ... ka ... nini. Mi ĉiam aŭdis tiun ... e, malĝustan formon. Sed ekde nun mi memoros diri Trukanini.”

Same subite, kiel ŝi ekkoleris, ŝi ridis. “Aĉulo Rob’son, li ĉiam diri Truganini!”

“Ŝajnas, ke lia eraro eterniĝos ...”

Trukanini ektusis, kaj la malagrabra sono de pulma likvaĵo aŭdiĝis.

“Kara, vi devas gluti vian pilolon,” diris milde s-ino Dandridge. Ŝi iris al ŝranko, elprenis skatoleton kaj elŝutis en la manon pinkan pilolon. “Malfermu la buŝon, kara. D-ro Jenkinson diris, ke tiu ĉi pilolo multe helpos.”

Post ioma hezitado Trukanini malfermis la buŝon kaj s-ino Dandridge metis la pilolon sur ŝian langon. “Diru aaa ...”

Trukanini eligis sonon, kiu iom similas al aaa, kaj dume la blankulino enmanigis trikilon kaj per la malakra fino provis puŝi la pilolon en la gorĝon. Trukanini fermis la buŝon, diris, “Tiu ulo li for en stomako,” kaj ree ekridis, kaj kraĉis la pilolon en sian manon.

“Kiom da fojoj ni devos fari ĝin hodiaŭ, kara?” demandis la pacienca mildulino. Mi ekkonsciis, ke mi atestas ofte ludatan teatraĵon. Fakte Trukanini elkraĉis la pilolon tri fojojn, tiam vere glutis ĝin.

“Ĉu vi frostas hodiaŭ, kara? Se jes, surmetu ankoraŭ alian jaketon.”

Mi sciis, ke tiu maljunulino, iom frostante tiun mildan aŭtunan tagon, tute ne portis vestojn eĉ vintre, kiam ŝi estis juna. Tiutempe la sola vesto de ŝiaj tribanoj estis tavolo da bestograso.

Ial Trukanini alridetis min, kvazaŭ kokete. Ŝi rigardis min per tiuj nedireble belaj okuloj, la solaj restaĵoj de la beleco, kiu ravis sennombrajn virojn de diversaj rasoj dum ŝia pli ol sesdekjara vivo.

Trukanini estis ĉies plej ŝatata knabino. Mangena la patro kaj la patrino Sulamini ne povis ne dorloti ŝin, sed ĉiuj aliaj tribanoj same admiris ŝiajn belecon kaj atletan kapablon. Same kiel ĉe la patrino kaj ĉiuj aliaj inoj, la kapo de Trukanini estis pritondata kaj preskaŭ kalva. La viroj kaj knaboj portis longajn harojn ornamitajn per ruĝa okro, la plej valora substanco de la mondo.

Trukanini estis ankaŭ diligenta lernantino. Ŝia Panjo montris al ŝi plekti korbojn kaj ŝnurojn, kapti ringovostulojn en arboj per fumo, kaj fosi por trovi radikojn kaj manĝeblajn bestetojn. Alia tasko estis baki filikoradikojn, distranĉi, kaj poste manĝi kune kun senharigita kanguruhaŭto. Kiam la tribanoj nomadis, kion ili ja ege ofte faris, la virinoj portis ne nur siajn bebojn surŝultre sed ankaŭ la akvujojn, kiujn ili mem faris el specialaj marherboj, ĉiujn korbojn, platan ŝtonon, sur kiu la edzo preparis sian okron, kaj antaŭ ĉio la fosbastoneton, la ĉefan laborilon. La viroj portis nur siajn lancojn, klablojn, kaj plej grave, unu portis la brulantan fajrobastonon. Tiu fajro estis ege grava parto de la vivo. Oni ne sciis fari fajron, kaj se ĝi estingiĝis, necesis peti de alia tribo. Trukanini sciis, ke neniu rajtas rifuzi doni fajron al alia tribo, eĉ al malamikoj.

Foje la virinoj starigis kabanojn. Ili puŝis en la teron la dikan finon de branĉoj, kunligis la aliajn finojn, kaj poste ŝtopis la plej grandajn truojn per arboŝelo kaj filikoj. Jam kiel knabineto Trukanini komprenis, ke virinoj devas multe pli labori ol viroj, sed ŝia patrino kaj la aliaj virinoj mute akceptis tion.

Sed pleje Trukanini amis naĝadon. Sulamini estis mem tre bona en la akvo, kiel multaj virinoj – pluraj viroj eĉ ne degnis lerni naĝi. Do estis ankoraŭ alia virina tasko plonĝi en la maron kaj kapti konkulojn. Ĉiuj

cedis, ke ankoraŭ juna Trukanini superas ĉiujn en tiu metio. Ŝi similis al supra fiŝo, kaj plonĝis ĝis nekredeblaj profundoj. Ankaŭ Murina, ŝia fratino, estis bona naĝanto, sed nekomparebla kun Trukanini.

Antaŭ ol ŝiaj koksoj plilarĝiĝis kaj la mamoj ekŝvelis en virina maniero, ŝia svelta korpeto ofte pensigis eksterulojn, ke ŝi estas knabo. Sed tuj, kiam ŝi direktis la belajn okulojn al iu, la ina ĉarmo estis nemiskomprenbla.

Ŝia tribo foje vizitis aliajn, foje aliaj venis al Nuenone-Insulo. Pro la multaj interrilatoj oni ricevis informojn kaj onidirojn de ĉiu parto de la granda insulo. Foje la triboj kverelis, kaj lastatempe tiuj kvereloj pliakriĝis pro tio, ke stranga palhaŭta popolo venis kaj forprenis kelkajn el la plej bonaj partoj de la tero. Ili kunvenigis same strangajn bestojn, kiuj forĉasis la kanguruojn kaj emuojn. Tribo perdinta sian plej bonan teron devis lukti kontraŭ alia tribo pri la restantaj lokoj.

La invadintoj, kiuj evidente intencis resti, ŝajnis esti malbonaj demonoj. Ili ne nur prenis la teron, ili ofte murdis la nigrulojn ŝajne nur por amuziĝo, same kiel la tribanoj de Trukanini dancis por amuziĝo. Oni parolis pri aĉegaj malsanoj, kiujn tiuj fremduloj disvastigis. Ili ne nur seksumis kun nigraj virinoj kaj poste redonis, ili ŝtelis kaj ne redonis. Estis ankaŭ rakontoj pri mortigaj malsanoj de la seksorganoj, se iam la fremduloj lasis la virinojn reiri al sia tribo. Infanoj estis ankaŭ ŝtelitaj. Entute la ĉeesto de la blankhaŭtuloj alportis morton post morto, kaj pro la malaperado de virinoj apenaŭ plu naskiĝis beboj. Trukanini ĝojis, ke ŝi ankoraŭ ne vidis tiujn fiulojn.

Unu bonan aferon la blankuloj kunportis: hundojn. Tiuj novaj bestoj tre helpis kapti kanguruojn kaj emuojn. Vizitantaj triboj donacis kelkajn al Mangena, kaj baldaŭ la hundoj multiĝis tiagrade, ke ili plinombris ol la homoj.

Foje, antaŭ ĉio dum vintraj noktoj, Mangena rakontis pri Mojherni, la Kreinto. Li estis tre bonintenca spirito. Sed la plenkreskuloj foje menciis timigajn fantomojn, kiuj nokte vagadas tra arbaroj. La nomo de unu el ili, Raŭra, restis en la kapo de Trukanini. Foje ŝi vekiĝis nokte kaj kredis aŭdi Raŭran apude. Se Raŭra kaptus ŝin, ŝi certe ne plu vivus, kaj ŝi eĉ pli timis tion, kion Raŭra farus al ŝi antaŭ ol ŝin mortigi.



Raŭra evidente ofte sukcesis ĉe ŝiaj tribanoj. Tre ofte oni devis bruligi kadavrojn, kaj Trukanini aŭdis maljunulojn diri, ke la tribo povus formorti.

Sed tage la mondo estis hela kaj bela, Raŭra estis tre malproksima, kaj ŝi ne pensis pri la danĝeraj fremduloj. Ĉu en bela arbaro aŭ en la maro, Trukanini estis amata kaj feliĉa knabino, filino de la ĉefo de Nuenone-Insulo. Oni nomis ŝin la belulino de Nuenone. Ŝi sciis, ke ŝia popolo loĝas tie ekde la komenco de la Tempo, kaj la ideo, ke ĝi povus formorti, ŝajnis tute ignorebla.

~~~~~

Tio subite ŝanĝiĝis iun nokton.

La tribanoj sidis sur plaĝo apud fajro kaj rakontis kaj ridis. Sen ajna averto grupo da homfiguroj, eble kvin aŭ ses, aperis de malantaŭ arbustoj kaj alkuris la tribanojn. Ĉiuj panike ekstaris kaj kriante fuĝis. Trukanini instinkte kuregis kaj konsciis nur, ke fine ŝia patro Mangena kaj ŝia fratino Murina kaj ŝi sukcesis trovi kaŝejon, kaj ke la fiuloj ne plu postĉasas ilin. Sed kie estis Sulamini, ŝia patrino? De sia kaŝloko ŝi ekvidis, ke la atakantoj estas tiuj blankhaŭtuloj en siaj strangaj vestoj, pri kiuj ofte parolis la plenkreskuloj. La fiuloj devigis du virinojn kuniri tien, de kie ili venis. Sed iu kuŝis ankoraŭ ĉe la fajro. Panikiĝe Trukanini intuciis, ke estas ŝia patrino. Tuj, kiam ŝi juĝis, ke la fiuloj vere foriris, ŝi alkuris. Ŝi haltis subite kaj ekhurlis. Jes, Sulamini kuŝis kaj sango fluis el ŝia dorso. Mangena alkuris kaj provis sidigi sian edzinon, sed ŝi ne reagis. La fajro ankoraŭ flagris sufiĉe forte, ke li vidu, ke ponardo eniris la dorson kaj elsuĉis la vivon de Sulamini.

La unuan fojon ŝiaj tribanoj persone renkontis blankulojn.

~~~~~

Kelkajn jarojn poste la tribanoj sciis, ke aliflanke de la insulo pluraj blankhaŭtaj fokĉasistoj establis loĝlokojn. Unue Trukanini, same kiel ĉiuj tribanoj, timoplene evitis la blankulojn. Sed fine la belulino kaj samaĝa knabino Pagerli aŭdacis iri proksimen. Je ilia surprizo la blankuloj donacis al ili kaj traktis ilin ĝentile. La knabinoj plikuraĝiĝis kaj decidis, ke ne ĉiuj blankhaŭtuloj estas tiel fiaj, kiel la plenkreskaj tribanoj ofte asertis. Ambaŭ knabinoj estis sekse maturaj, kaj ili konsciis, ke ili plaĉas al tiuj fokĉasistoj. Dum la dua vizito – sen gepatra permeso – la knabinoj seksumis kun kelkaj blankuloj kaj ricevis teon, kiu tre bongustis. La seksumado mem same bongustis, kaj ili ne komprenis, kiam iom poste iliaj korpoj doloris, ke tio estas sekvo de amorado kun la fremduloj. Nur jarojn poste Trukanini ekscios, ke pro la malsano transdonita de iu blankulo, ŝi neniam naskos bebon.

Sed sekvis pli da hororo kaj timoj. Iun tagon aperis aliaj fokĉasistoj kaj ili brutale ŝnurligis Murinan, la fratinton de Trukanini, kaj trenis ŝin al boato. Neniam plu oni aŭdos ion pri Murina.

Iom poste Trukanini edziniĝis al Paraŭina. Ŝi eĉ ne havis sufiĉe da tempo por decidi, ĉu la edzo plaĉas aŭ ne. Ŝi kaj Paraŭina kaj alia junulo decidis remi primitivan boateton al la ĉefa insulo, eble dek kilometrojn for de Nuenone-Insulo. Ili senprobleme atingis la marbordon, sed la boateto, farita el arboŝelo kaj herboj, intertempe tiel malsekiĝis kaj saturiĝis, ke ĝi ne atingus Nuenone revenvoje. Estis stulta eraro de nematuraj junaj homoj, kiuj ignoris la avertojn de la pliaĝaj tribanoj. Ili ne vere ĝuis sian tempon sur la ĉeftero, sed subite venis al ili du arbosegistoj kaj demandis, ĉu ili povas helpi. Paraŭina konis sufiĉe da anglaj vortoj por klarigi la problemon. La du segistoj, Watkin Lowe kaj Paddy Newell, malavare proponis uzi sian plirezistan remboaton por revenigi la nigrulojn al Nuenone. La tri nigruloj ĝojis pri la bonkora propono, kaj la kvinopo ekveturis.

Lowe kaj Newell remis. Kiam ili atingis sufiĉe profundan akvon, ili subite ĉesis remi, kaptis Paraŭina kaj la alian junulon, kaj ĵetis ilin en la maron. Ili ree ekremis kaj provis meti distancon inter si kaj la du nigrulojn en la akvo, sed Paraŭina kaj la alia knabo bone naĝis kaj atingis la boaton. Kiam ili ekkaptis la flankon de la boato kaj provis levi sin enen, Newell prenis hakilon kaj per kvar fortegaj batoj amputis la manojn. La ŝrikantaj junaj nigruloj falis en la akvon kaj ne kapablis resti surface. Trukanini

sidis, paralizita de hororsento, dum la du junuloj malaperis kun la sangoŝprucigaj brakoj supre.

Lowe kaj Newell remis reen al la ĉeftero kaj alterne seksumis kun Trukanini, ĝis ili laciĝis. Ili lasis sin kuŝantan kaj senbrue plorantan.

Kiam ŝi kapablis ree marŝi, Trukanini iris al loko, kie la markolo inter la ĉeftero kaj Nuenone-Insulo estis nur eble kvin kilometrojn larĝa. Ŝi sukcesis naĝi hejmen, sed estis en terura stato dum tuta semajno poste.



Sed malgraŭ tiuj traŭmatoj Trukanini ne restis eterne malĝoja. Ŝia natura vivoforto ree transprenis. La nomada vivo instruis, ke oni prenu aŭ faru tion, kio donas avantaĝojn, kaj ĉiam plueniru al lokoj, kie oni trovos bonajn manĝaĵojn aŭ aliajn dezirindaĵojn.

Iom poste Trukanini kaj Pagerli refoje iris al la fokĉasistoj. Tiuj viroj ne ĉiuj samis: kelkaj estis solecaj kaj eĉ agis tenere al la knabinoj kaj plenumis iliajn dezirojn trinki teon aŭ fumi tabakon. La nigraj edzoj ofte pruntis siajn edzinojn por gajni ion de fremduloj; kial estu problemo, se la virinoj sin proponas? Krom tio, estis tre malmultaj nigraj viroj ankoraŭ vivantaj.

La belulino de Nuenone sopiris al aventuroj ekster la eta mondo de la hejma insulo, kaj ŝajnis, ke blankaj viroj donos al ŝi ŝancon sperti tiujn aventurojn.

Vizitantaj nigruloj volis havi Trukanini kiel edzinon, kaj pli kaj pli Vuradi, unu el la lastaj *nuenoneanoj*, postĉasis ŝin. Ŝi ŝatis la rakonttalenton de Vuradi, kiu preskaŭ ĉiuvespere distris la ceterajn per malnovaj legendoj, sed li estis tro aĝa kaj simple ne plaĉis al ŝi kiel viro.

Sed kiam ŝi estis dekokjara eniris ŝian vivon viro, kiu vere kaptos ŝian koron. Li ja estis videble pli aĝa ol Vuradi, sed li estis blankulo kaj nerezistebla: ŝaga, kuraĝa, kun nekredebla fizika eltenemo. Li montris

intereson pri ŝia tribo, pri ĝia lingvo, pri ŝi. Li donos al ŝi dolĉan karesnomon: Lidguĝi.

Ŝi bone konsciis, ke lia ĝusta nomo estas s-ro George Augustus Robinson, sed ŝi nomos lin Robson. Dum jardekoj ŝi admiros, amos, servos lin kaj plurfoje savos lian vivon. Kiel ŝi sciu, kiel amare ĉio finiĝos?

Certe la domo kaj ĝia granda korto estis imponaj, sendube inter la plej luksaj en Bath.

S-ro Robinson ege volonte montris kaj klarigis al mi; li diris, ke li sentas sin iomete soleca, ĉar s-ino Robinson kaj la du etuloj vizitas ŝiajn gepatrojn kaj li estas sola en la domo – li ne povus nomi la servistino kaj la ĝardeniston “kompanion”. Mi devis rapide marŝi por ne esti tro malantaŭe, dum lia malalta, korpulenta figuro estis portata de loko al loko de liaj ankoraŭ fortaj, rapidmovaj kruroj. Kvankam ne altstatura, li havas grandan kapon kaj grandan, larĝan nazon, kaj tre grandan frunton. Mi sciis pri lia reputacio kiel mesmeristo, kaj jes, liaj grize bluaj okuloj povus sorĉi.

Jen, li montris, la manĝoĉambro (tre granda, kun loko por almenaŭ dudek homoj); la salono (spektakle granda, kun multekostaj pentraĵoj el Francio kaj Italio sur la muroj); la biblioteko (impona, kun kelkaj volumoj en la franca kaj itala, sed atenton kaptis vojaĝoj de Marco Polo kaj aliaj grandaj mondesploristoj); eĉ lerneja ĉambro (kies celon mi ne facile divenis); sep kompletaj dormoĉambroj sur la supra etaĝo (tiujn ni ne eniris, sed li certigis al mi, ke ili havas sistemon de forigo de urino kaj fekaĵoj per akvofluo, la plej lastadatan teĥnologian elpensaĵon); en la subtera etaĝo estis ĉambro por la domservistino, du kuirejoj, manĝaĵ-deponejo, vinkelo kaj diversaj oficejoj. Li diris, ke en preskaŭ ĉiu ĉambro funkcias gaslampoj. Ekstere estas hektaro de gazono, flor- kaj legom-bedoj, du someraj dometoj, remizo por kaleŝo, kaj ĉevalstaloj.

“Kaj rigardu sinjoro la ĉirkaŭaĵon la urbo sub ni kaj la valo de la Avon serpentumas en plej ĉarma maniero non è vero?” Mi rapide konstatis, ke s-ro Robinson parolas same kiel li skribas, sen komoj kaj malofte kun punktoj. Lian entuziasmon oni devis admiri: tiom da juna vervo en viro sepdekdu-jara vere imponis.

Mi jam nerekte sciigis al s-ro Robinson, ke ankaŭ mi devenas de familio malaltklasa; oni avertis min, ke malgraŭ lia videbla sukceso li estas ankoraŭ tre sentema pri desupra klasa snobeco. “Sinjoro, ĉu via ne estas legenda ekzemplo de anglo, kiu iras al unu el niaj kolonioj kaj revenas riĉulo?”

“Nu ...” li nekarakterize paŭzis, sed evidente mia komplimento ŝveligis lian bruston, “nu jes oni povas tion diri.” Malgraŭ liaj klopodoj paroli kiel mezklasa riĉulo la intonacio de malriĉa kvartalo de Londono foje ne tute sufokiĝis.

“Sed viakaze ne temas pri vasta ŝafbieno.”

Li ridetis ruze: “Mi sciis tamen lerte manipuli per oro kaj kiam mi estis refoje en Anglio mi multe profitis kaj la rezulton vi vidas antaŭ viaj okuloj sinjoro n’est-ce pas?”

“Kaj kompreneble vi estas fama ĉefe pro via laboro kiel protektanto de aborigenoj.”

S-ro Robinson bone sciis, ke mi povus aldoni “kaj tamen la aborigenoj formortas,” sed li levis la manojn kaj diris, “Mi montros al vi ekzemplon de tio kion mi devis dum multaj jaroj kontraŭi venu kun mi.”

Li kondukis min refoje en la bibliotekon, malfermis keston, kaj elprenis malnovan ekzempleron de *The Times*. Li malfermis ĝin kaj montris karikaturon kun la subteksto “Ĉu la mankanta ĉenero?” Maldekstre sur la karikaturo estis gorilo, dekstre estis moderna *homo sapiens*, kaj meze, kun trajtoj de ambaŭ, estis nuda aŭstralia aborigeno.

“Vidu sinjoro dum tiom da jaroj mi luktis ke oni agnosku la vivorajton de la aborigenoj kaj ilian inteligenton en la arbaro ili estas multoble pli kapabla ol ni eŭropanoj kaj fotelsidaj desegnistoj en Londono aŭdacas produkti tiajn misfamigojn! C’est une honte!”

La doloro sur la ronda vizaĝo sub la multe tro malhela peruko estis, kiom mi povis juĝi, tute aŭtenta. La mieno transdonis la mesaĝon: se mia laboro kiel protektanto ne plene sukcesis, do pro tio, ke aliaj eŭropanoj havas antaŭjuĝojn kontraŭ la homoj, kiujn mi provis protekti.

“Sendube vi scias, s-ro Robinson, ke via raporto pri Flinders-Insulo famiĝis kaj estas nur rigardata kiel modelo por administristoj en ĉiuj kolonioj de Britio. Jen vere granda honoro por vi, nicht wahr?” Kial mi ne uzu germanaĵon reage al liaj fremdlingvaj ornamaĵoj?

Liaj okuloj, ĝis tiam helaj pro memfido, iĝis evitemaj. “Nu jes la vicguberniestro Arthur kaj lia posteulo Franklin ege alte taksis mian laboron kaj plusendis al Londono kiel ekzemplon tion mi bone scias.”

“S-ro Franklin pereis ie dum ekspedicio en la terura polusa regiono.”

“Kompreneble mi scias tion sinjoro li estas nacia heroo.” Lia voĉo akriĝis.

“Ĉu vi aŭdis flustrojn, ke inter la mortantaj ekspedicianoj estis kazoj de kanibaleco?”

“Eble ja estis sed nur homoj kiuj estis en ekstrema danĝero povas juĝi tion ĉu malbona aŭ ne.” Li paŭzis, li, kiu foje estis en ekstrema danĝero. “Jes ja eĉ inter la homoj de Phillip-Haveno estis kazoj de kanibaleco sed mi ne nomas ilin pro tio diabloj ni britoj kiuj manĝas trifoje tage ne pretendu la rajton juĝi.”

“Cetere, ĉu vi scias, ke damo Franklin baldaŭ vizitos Bath?”

S-ro Robinson tre paliĝis kaj mi havis la impreson, ke li similas al ĉasata besto en senelirejo. La boraj okuloj, ĝis tiam memfidaj, iĝis subite evitemaj: “Damo Franklin? La edzino de ...?”

“Jes, sinjoro, tiu fortvola damo venos baldaŭ.”

S-ro Robinson staris kun malfermita buŝo, forgesante, ke li gastigas min. “Ŝi venos ĉi tien ...” li diris al si mem. Dummomente la junuleca vervo forlasis lin.

Mi juĝis prudente ŝanĝi la temon. “Onidire via akompanantino Trukanini estas la lasta vivanta aborigeno de Van-Dimen-Lando.”

“Truganini? Certe ne la lasta estas aliaj virinoj sur najbaraj insuletoj sed sendube Truganini ŝatas la famon esti rigardata tiel jes oni eĉ ŝin nomas reĝino Truganini ha ha ŝi neniam estis reĝino.”

“Ŝi estis tre utila al vi dum viaj ekspedicioj, ĉu ne?”

Li paŭzis kaj ŝajnis rigardi malantaŭen en foran landon aŭ epokon. “Jes tre kapabla virino ege bone naĝis tre sangvina temperamento ankaŭ tre bela en tiu tempo ...” Lia mieno moliĝis kaj li diris al si, “Lidguĝi ...”

Li saltis al alia temo: “S-ino Robinson estas graveda la trian fojon.”

“Ĉu vere? Kaj vi estas pli ol sepdekjara. Elkoran gratulon!”

Kial la pensosalto? Aha, mi intuciis, ke li konfesis – eble nekonscie, eble tute konscie – ke li seksumis ankaŭ kun Trukanini.

# KONTAKTOJ

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta versio de la verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).



# KAPTOJ

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta versio de la verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# LA KOMANDANTO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta versio de la verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# LA PROTEKTANTO

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta versio de la verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# LA LASTAJ

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la kompleta versio de la verko, akirebla de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be).

# Kolofono

**Titolo** Paradizo Ŝtelita

**Aŭtoro** Trevor Steele

**Kovrilo** Julia Litvinova

**ISBN** de la papera eldono 978 90 77066 49 2

**UDK** 82.3.892

**NUR** 300

**Leĝa depono** de la papera eldono 2012/2924/1

Stafeto serio n-ro 36

**Eldonis** Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antverpeno

[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)

© 2012 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekzemplero de „Paradizo Ŝtelita” estas nekompleta provversio kaj rajtas esti kopiata laŭplaĉe.